

Lukto favora al la Kulturo

Henri Micard, komencanta instruisto, ne sentis sin tre kontenta en la urba lernejo. Li petis postenon en vilaĝo kaj estis sendita al Broglie, en departemento Eure, urbeto, kies nomo estas mondkonata, ĉar tie staras la kastelo de la familio de Broglie al kiu apartenas Maurice kaj Louis-Victor, famekonataj fizikistoj, kaj naskiĝloko de alia granda fizikisto Augustin Fresnel. En Broglie Henri Micard konis familian vivon ĉe la lernejestro Sro Raboisel, despli feliĉe ke la tuta salajro de la juna instruisto ne atingis la gastoprezon en hotelo! Lia fizika stato pliboniĝis, li daŭre korespondis kun Marie-Thérèse kaj la 5-an de Aŭgusto 1919, en Noyen (departemento Sarthe), la gejunuloj geedziĝis. Nova venko por la junulo: je tiu okazo li tute forlasis sian duan lambastonon kaj iris al la urbdomo sin apogante sur promenbas-

du monatoj. Sed la patro daŭrigis sian studadon ĝis la printempo 1921, kiam, lacigite de troa laboro li malsaniĝis: pulma lezo. Ambaŭ laboroj ĉesis, la profesia kaj la persona, kaj post resaniĝo la geinstruistoj estis senditaj al malgranda vilaĝo, kie la laboro ne estis tiom streĉiga. Tie en La Haye-Aubrée naskiĝis filino, Josette. En tiu vilaĝeto, kie la tute novkonstruita lernejo staris ekster la domaro, Henri Micard fariĝis vilaĝa administra sekretario. Nova laboro al kiu li devis alkitimiĝi sed plaĉa al li pro tio, ke li ne plus povis labori cele al instruado en liceo, kaj ankaŭ, ke li sentis sin pli proksima de la vilaĝanoj, pli bone konatiĝis kun iliaj vivo kaj zorgoj. Li ankaŭ retrovis tiamaniere iom el siaj infanjaroj.

En 1925, gesinjoroj Micard decidis forlasi la de-



La 5-an de Aŭgusto 1919 Henri kaj Marie-Thérèse geedziĝis

tono kaj sur la ŝultro de sia edzino. Nova simbolo, ĉar la junulino, kiu morale tiom helpis la kriplulon de nun fariĝis sindonema edzino kaj helpis, ĉiutage subtenis la edzon en ĉiuj aspektoj de lia aktiva vivo, ĝis lia morto.

En Septembro la juna paro ricevis duoblan postenon en Cormeilles (alia urbeto de la departemento Eure) riĉa je XIa, XVa kaj, XVIa jarcentaj monumentoj. Henri Micard, ne lacigebla, opiniis, ke lia venko kontraŭ la sorto ne sufiĉis, kaj decidis daŭrigi sian studadon por instrui en liceo. Dum du jaroj li tiucele studis frumatene antaŭ la malfermo de la lernejo, malfrue vespere post la profesia laboro.

En Aŭgusto 1920 naskiĝis knabo, kiu mortis post

partementon Eure kaj alproksimiĝi al siaj gepatroj vivantaj en La Flèche (Sarthe). Ili petis, pere de profesia bulteno interŝanĝantojn kaj tiamaniere venis al Epineux-le-Séguin, tiu malgranda vilaĝo kiu baldaŭ fariĝis konata en la tuta mondo. Tien, kie naskiĝis filo: Jean, ili alvenis en Aprilo 1926, La lernejo estis kaduka, tre malĝojiga post tiu bela konstruaĵo de La Haye-Aubrée. En la antaŭa posteno la du klasoj estis geaj. En Epineux-le-Séguin (316 loĝ.), knabinoj kaj knaboj estis en apartaj klasoj. Ciu el la geinstruistoj devis instrui 35 infanojn de ĉiuj niveloj. Ankaŭ tie Henri Micard estis vilaĝa sekretario kaj tuj laboregis zorgante pri la infanoj en kaj ekster la lernejo kaj ankaŭ post iliaj lernejaj jaroj. Plurfoje ĉiusemajne, dimanĉe, la geinstruistoj kunvenigis la postlerneĵanoj por daŭrigi la instruadon, distri ilin,